# por muzikemaj

Tuttempa tutesperanta retradio
muzaiko.info

Esperanta muzikeldonejo
vinilkosmo.com

Datenbazo pri Esperanto-kulturo kaj arto
artista.ikso.net

Muzika festivalo FESTO
festo.jefo.fr

Kultura Esperanto-Festivalo
kef.saluton.dk

Vikipedio pri Esperanto-muziko:
eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-muziko

# adresoj

Kantaro-Vikio
kantaro.ikso.net

Edukado@Interreto
ikso.net

# kantaro.ikso.net

via centro de
ESPERANTA
MUZIKO!

Do, ekde la jaro 2003 Kantaro-Vikio estas loko por ĉiu muzikema esperantisto, kie eblas trovi multajn kantotekstojn, notojn, videojn kaj aliajn muzikaĵojn. Ĝi funkcias kiel vikio (same kiel Vikipedio) kaj ebligas komunan laboron de esperantistoj el diversaj mondopartoj. Ĝi riĉiĝas de tago al tago, danke al krea laboro, korektoj, aldonoj kaj rimarkoj.

Rezultas tio tre rimarkinde: nun en la Kantaro-Vikio troviĝas tekstoj de pli ol 3000 kantoj! Tio estas rekorda atingo por Esperantujo. La Kantaro-Vikion uzas komencantoj, gvidantoj de kursoj, amatoraj ludantoj, mem aŭtoroj kaj muzikistoj, kaj finfine ĉiuj muzikemuloj! Se vi antaŭe ne vizitis nian vikion, ne prokrastu, eble vi trovos ĉe ni delonge serĉatan amatan kanton.

Miloj da kantoj troviĝas en klara aboca strukturo. Krom kantotekstojn vi povas trovi ankaŭ muziknotojn, akordojn, tonsilabajn melodiojn, MIDI-dosierojn kaj ankaŭ eblas spekti videojn. Kun filmoj vi povas vidi originalan plenumadon, aŭdi kantojn, kunkanti kun amataj muzikgrupoj kaj kantistoj. Etikedoj, akompanantaj la kantotekstojn, faciligas serĉadon kaj strukturigas la kantaron. En la Kantaro-Vikio trovis sian duan vivon ankaŭ paperaj kantaroj. En speciala paĝo vi povas trovi liston de paperkantaroj kaj kantotekstojn el ili.

Fari ŝanĝojn en la Kantaro-Vikio povas ĉiu uzanto. Eĉ se vi ne konas plenan tekston, aŭ forgesis ekzemple aŭtoron, ne hezitu, aldonu vian kanton! Sekve ĉiu uzanto povos fari ŝanĝojn, korekti erarojn kaj aldoni pliajn materialojn.

Sortimento de muzikaj stiloj, prezentitaj per la kantoj impresas. En la vikio haveblas kaj klasikaj kaj modernaj kantoj. Multas kantoj tradukitaj de nacilingvoj, movadaj, por ĥora plenumado, krist-naskaj, infanaj, rokaj, popaj kaj multaj, multaj aliaj.

La farita laboro estas grandega! Dankon al niaj vikiuzantoj, kiuj riĉigas la kantaron de longa tempo, dankon al ĉiuj aŭtoroj, kiuj permesis publikigi siajn verkojn tie, dankon al ĉiuj kontribuantoj, kiuj tajpis almenaŭ unu literon tie, dankon al vizitantoj, kiuj serĉadas kaj trovadas kantojn en la Kantaro-Vikio!

Simbiozo de la Kantaro-Vikio kaj Edukado@Interreto ebligas la tutan projekton. Venu, vidu, kunkantu!